



Universala Esperanto-Asocio. Jen serio de gvidiloj pri plej diversaj funkcioj kaj aspektoj de la asocia vivo.

La Komitato de UEA estas la supera decidorgano de Universala Esperanto-Asocio (UEA). Ĝi aprobas la estrarajn raportojn (tekstajn kaj financajn), akceptas buĝeton por la spezoj de la sekva jaro kaj aprobas signifajn modifojn al la uzo de la asocia kapitalo. Ĝi ne nur difinas aŭ akceptas la strategiajn direktojn por la asocia agado, sed plie kunlaboras en la realigo de projektoj konformaj al tiuj direktoj. Tio signifas, ke komitatano de UEA portas grandan respondecon, kaj al la Asocio mem, kaj al la homgrupo, kiun ŝi aŭ li reprezentas en la Komitato.

Roloj de komitatanoj

Demokratia organo: Estas la respondeco de ĉiu komitatano voĉdoni pri ĉiuj prezentitaj proponoj, ĉu kadre de fizikaj kunsidoj en la Universala Kongreso, ĉu pere de reta voĉdonado tra la jaro. Komitatanoj, kiuj reprezentas klare difinitan publikon (esence la komitatanoj A) estu pretaj konsulti la Landajn aŭ Fakajn Asociojn kiujn li reprezentas, kaj kun lokaj aŭ fakaj grupoj kaj unuopaj membroj de UEA.

Labororgano: Aktivaj komitatanoj povos proponi sin aŭ aliajn por eniri komisionojn de la komitato aŭ la estraro. La Komitato starigas aron da komisionoj kaj ĉiujare taksas iliajn laborojn. Por efike kunlabori, gravas, ke komitatanoj legu kaj konu la Strategian Planon de la Asocio, kune kun ĝiaj bazaj gvidodokumentoj (Statuto, Regularoj, Buĝetoj kaj Spezokontoj).

Ideokrea organo: Komitatanoj estas invitataj proponi ideojn por la agado de la Asocio, laŭeble kune kun skemo, minimume skiza, por konkrete realigi la ideon – kunestu proponataj realigantoj, financaj rimedoj kaj tempo-skemo. Tiuj ideoj povos atingi la estraron, la konsilion, la aliajn komitatanojn kaj koncernatajn komisionojn.

Varba organo: Komitatanoj estas kuraĝigataj teni regulan kontakton kun la Landaj Asocioj en sia loĝlando, kun ties kotizperanto kaj Ĉefdelegito, por kune pretigi sisteman varbadon por altigi la nombron da UEA-membroj, aŭ por konvinki membrojn altigi sian membrokategorion kaj eks-membrojn realiĝi.

Talentekspona organo: Komitatanoj estas kuraĝigataj konigi la ĉeeston aŭ aperon de homoj kun aparte valoraj talentoj, kunlaborigeblaj por plenumi pli efike la Asociajn celojn.

Plena listigo de la rolo de komitatanoj legeblas en la Statuto de UEA (alineo 29).

La kondiĉoj por komitataneco

La kondiĉojn por komitataneco difinas la Statuto de UEA (alineo 26). Pliaj konsultiloj estas (samloke) la Ĝenerala Regularo, la Komitata Regularo kaj la Regularo pri interreta voĉdonado (klarigota per aparta gvidilo). Plie ekzistas valora dokumento, kiun pretigis Mark Fettes en 2013 por gvidid komitatanojn tra tiuj regularaj priskriboj: Konsilaro por Komitatanoj.

La konsisto de la Komitato

Fine de 2015 la komitato havas 61 membrojn. Ĝi konas tri kategoriojn de Komitatojn:

A-komitato estas elektita de Landa aŭ aliĝinta Faka Asocio proporcie al ĝia membronombro, kiel difinita en la Statuto de UEA (alineo 23). A-komitatoj estas anstataŭigeblaj laŭ proceduro priskribita en la Statuto de UEA (alineo 28). La Asocio havas momente 44 komitatojn, kiuj reprezentas Landajn Asociojn kaj 4, kiuj reprezentas aliĝintajn Fakajn Asociojn kaj 2 de TEJO. Sekve fine de 2015 estas entute 50 A-komitatoj.

B-komitato estas elektita ĉiun trian jaron de la individuaj membroj de la Asocio (en ajna kategorio), laŭ nombro fiksita en la Statuto de UEA (alineo 24). Fine de 2015 estas ses B-komitatoj.

C-komitato estas elektita ĉiun trian jaron de la nove nomumitaj aŭ elektitaj A- kaj B-komitatoj. La celo estas enpreni homojn kun apartaj lertoj aŭ konoj, kiuj povos utile kontribui al la asociaj laboroj kaj fari saĝajn decidojn ene de la komitato. La maksimume permesata nombro estas difinita en la Statuto de UEA (alineo 25). Fine de 2015 estas kvin C-komitatoj.

Aldone al ili estas observantoj, nomumitaj de landoj kun malpli ol cent membroj (aligitaj kaj individuaj). Ili havas parolrajton, sed ne rajtas voĉdoni. Vidu la Statuton de UEA (alineo 27). Fine de 2015 estas naŭ observantoj.

La Statuto de UEA estas legebla en la retejo de UEA ĉe: **Teko > Statuto kaj Regularoj**

La plena listo de komitatoj kaj observantoj aperas ĉujare en la Jarlibro, je ĉ. paĝo 20 kaj en la retejo de UEA kun fotoj. Rigardu ĉe: **Asocio > Komitato**.

Temposkemo por la komitata vivo

Komitatoj havas trijaran mandaton. La Komitato oni rekonsistigas en la jaro de la estraraj elektoj, tiel ke nova Komitato elektas la novan estraron. Jen la skemo:

Kategorio	Komenco	Fina rezulto	Komento
A-komitatoj	Frue en elektojaro, aŭ alitempe.	Ĝis la 31a de majo de la elektojaro.	Landaj Asocioj rajtas interne diskuti kaj poste komuniki siajn decidojn.
B-komitatoj	Decembro de la antaŭa jaro	Junio de la elektojaro	Okazas voĉdono se la kandidatoj plias ol la permeseblaj lokoj.
C-komitatoj	Dum la UK	Dum la UK	Oni sendu proponojn al A- aŭ B-komitatoj.
Observantoj	Same kiel por A-komitato.	Same kiel por A-komitato.	Devas okazi la elekto de unu komitato.

La Komitato en Universalaj Kongresoj (UK)

Rekone al la granda laboro atendata de komitatoj, kaj la devo surloki pli frue ol aliaj kongresanoj, UEA ofertas rabaton je 50% je la kongresa aliĝkotizo. En kongresaj kunsidoj, kvorumo estas

En neelektaj jaroj (t.e. du el tri)

Kutime, la Komitato kunsidas en la pleno dufoje en la kongresa semajno, kaj plie laboras pere de komitataj forumoj, kiuj tamen estas pbulikaj kunvenoj. Jen resumo pri la tri elementoj:

La unua plenkunsido okazas en la komenca sabato, ekde 14.00h. En tiu sesio oni kontrolas la kvorumon, reesploras la plenumon de decidoj el antaŭaj kunsidoj, invitas proponojn por novaj komitatanoj C (se restas vakaj lokoj) kaj aŭdas raportojn pri la agado en la lasta jaro. Oni havas eblon starigi dumkongresajn komisionojn.

La komitataj forumoj kutimas okazi fine de la posttagmezo inter 16.00h kaj 18.00h. Komitatanoj estas instigataj ĉeesti tiom, kiom eble el ili, kaj certe minimume unu el ili. Kutime ili okazas laŭ jena sinsekvo, sed tio povos varii depende de la bezonoj de unuopaj kongresoj:

Lunde: Forumo pri Konsciigo

Marde: Forumo pri Kapabligo

Ĵaŭde: Forumo pri Komunumo kaj pri Kunordigo (unu el ili en aliaj horoj).

La dua plenkunsido okazas en la kongresa vendredo, matene ekde 09.00h. Ĝi devas finaprobi la estraran raporton pri agado en la antaŭa jaro, rigardi kaj voĉdoni pri rekomendoj el la komitataj forumoj kaj konsenti pri la dato de la sekva kunsido.

En elektaj jaroj (t.e. unu el tri – 2016, 2019, 2022)

En tiuj jaroj, aldone al la supre skizita skemo, okazas plia kunsido pro la ekstraj elektaj taskoj inkluzive de elekto de nova estraro por la sekva trijara periodo. Por la elektoj la konsisto de la nova komitato estas jam fiksita. Komitatanoj A kaj B estas konata antaŭ UK, komitatanojn C oni elektas en la unua (sabata) kunsido. Sekvas la elekto de nova estraro, en la sabato aŭ la dua kunsido. Senŝarĝigo de la malnova estraro kaj ekofico de la nova okazos nur fine de la raporto pri la laboro de la ĵusa jaro, kio kutime okazas en tiu dua (ekstra) kunsido. Tra la cetera kongreso plue aktivigas la ĝistiamajn estraranojn kune kun la novaj.

Informfontoj: ([//finverkota](#))

Komitata diskutgrupo. Nuntempe ĉe Yahoo, sed kun klopodoj starigi novan foruman solvon, kie unuopaj temoj ricevas propran fadenon.

TEKO en la retejo de UEA (www.uea.org/teko/komitato), Tio listigas laŭjare serioj da elŝuteblaj komitataj dokumentoj: protokoloj, tagordoj, buĝetoj, spezkontoj, regularoj kaj dokumentoj diskutendaj ktp.

Aliaj partoj de la TEKO: Tiuj videblas kaj alireblas per serio da enirvortoj maldekstre listigitaj: Pri la teko, statutoj kaj regularoj strategiaj dokumentoj, kongresaj dokumentoj, informado, UN-rilataj dokumentoj, Biblioteko Hector Hodler, [komitata elŝutejo], Por agado, elŝuteblaj libroj, bibliografioj, vikio.

UEA retejo: La ĉefaj rubrikoj de la nuna asocia retejo estas: UEA?, Aktuale, Asocio, Strategio, Landoj, Fakoj, TEJO kaj la TEKO. Indas esplori la retejon de TEJO inter multo alia kun priskribo de ĝia komitato.

Kiel fari utilajn aferojn...

Kiel aldoni proponojn al la tagordoj de la Estraro aŭ Konsilio?

Skribu al la Mastruma teamo ene de la Estraro, pere de la adreso de la ĝenerala sekretario.

Kiel akiri praktikajn informojn?

Jen ebloj por kontakti la Centran Oficejon: direktoro@co.uea.org, financoj@co.uea.org, libroservo@co.uea.org.

Jen aliaj utilaj kontaktoj:

Akademio de Esperanto:

www.akademio-de-esperanto.org kaj <konsultejo<ĉe>akademio-de-esperanto.org>

Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED):

Per adreso de la Centra Oficejo

TEJO:

Oficejo<ĉe>tejo.org

ILEI:

ilei.sekretario<ĉe>gmail.com

GVID 02 KOM.DOCX kaj PDF